



Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

Tutmonda Biblioteko je la
memoro de L. Tolstoj.

..... № 14

KVAR TAGOJN SUR KAMPO DE BATALO.

RAKONTO DE
VSEVOLOD GARŜIN.

*Tradukis el la rusa lingvo
N. Kabanov.*

La traduko estas korektita de la anoj de Esper. Literat.
Asocio: s-ro H. A. Luyken (Anglujo), Prof. P. Mathews
(Anglujo), s-ro J. Robbie (Skotlando), s-ino Weggemann-
Guldemandt (Holando).

ELDONO № 1116 DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

ЧЕТЫРЕ ДНЯ НА ПОЛѢ СРАЖЕНІЯ. Всеволода Гаршина.
ВЪ ПЕРЕВОДѢ НА ЭСПЕРАНТО.

Издание „ПОСРЕДНИКА“.

Moskvo. 1916.

Tutmonda Biblioteko je la memoro
de L. Tolstoj.

№ 14.

KVAR TAGOJN SUR
KAMPO DE BATALO.

RAKONTO DE

Vsevolod Garŝin.

Tradukis el la rusa lingvo

N. Kabanov.

La traduko estas korektita de la anoj de Esper. Literat.
Asocio: s-ro H. A. Luyken (Anglujo), Prof. P. Mathews
(Anglujo), s-ro I. Robbie (Skotlando), s-ino Wegge-
mann-Guldemandt (Holando).



ELDONO DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

№ 1116.

Moskvo, 1915.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.



Типо-литографія Т-ва И. Н. КУШНЕРЕВЪ и К^о. Пименовская ул., соб. д.

Москва—1915.

KVAR TAGOJN SUR KAMPO DE BATALO.

Rakonto de V. Garŝin.

Mi memoras, kiel mi kuris en arbaro, kiel kugloj fajfis, kiel deŝirataj de ili branĉoj falis, kiel ni traŝiradis tra arbetaroj de kratago. Pafoj fariĝis pli oftaj. Io ruĝa, aperanta kaj malaperanta, montriĝis apud rando de la arbaro. Sidorov, juna soldato de la unua roto („kiel li montriĝis en nia linio?“ dum momento venis al mi en kapon), subite eksidis teren kaj silente ekrigardis min per siaj grandaj timoplenaj okuloj. Sango fluis el lia buŝo. Jes, mi bone memoras ĉi tion. Mi memoras ankaŭ, ke preskaŭ apud la rando de la arbaro, en densaj arbetoj, mi ekvidis... lin. Li estis altkreska, dika turko, sed mi kuris rekte al li, kvankam mi estas malforta kaj malgrasa. Io ekfrapis, io, kiel ŝajnis al mi, grandega preterflugis; al mi eksonis en la oreloj. „Li ekpafis kontraŭ mi“, mi ekpensis. Kaj li, kun kriego de teruro, sin alpremis per la dorso al densa arbeto de kratago. Estis eble ĉirkaŭiri la arbeton, sed li memoris nenion pro timo kaj sin direktis rekte sur dornajn

branĉojn. Per unu ekbato mi forbatis pafilon el liaj manoj, kaj per alia ekbato mi enŝovis ien mian bajoneton. Io aŭ ek-murmuregis, aŭ ekĝemis. Poste mi ekkuris pluen. La niaj kriis „hurà!“, falis, pafis. Mi memoras, ke mi ankaŭ faris kelkajn pafojn, jam elirinte el la arbaro, sur kampon. Subite „hurà“ aŭdiĝis pli laŭte, kaj ni ĉiuj per unu fojo ekmovis nin antaŭen. Tio ĉi estas ne „ni“, sed la niaj, ĉar mi postrestis. Tio ŝajnis al mi stranga. Ankaŭ pli stranga estis tio, ke subite ĉio malaperis; ĉiuj krioj kaj pafoj silentiĝis. Mi aŭdis nenion kaj vidis nur ion bluan; verŝajne, ĝi estis la ĉielo. Poste ĝi ankaŭ malaperis.

Mi estis neniam en tia stranga stato. Ŝajnas, ke mi kuŝas sur la ventro kaj vidas antaŭ mi nur malgrandan pecon da tero. Kelkaj herberoj, formiko, rampanta sur unu el ili, kapo malsupren, iaj pecetoj de la pasintjara herbo—jen estas tuta mia mondo. Kaj mi vidas ĝin nur per unu okulo, ĉar la alia estas fermita per io malmola, verŝajne, per branĉo, sur kiu mia kapo apogiĝas. Al mi estas tre malkomforte, kaj mi volas, sed mi tute ne komprenas, kial mi eĉ ne povas movetiĝi. Tiel tempo pasas. Mi aŭdas krakadon de kampaj griloj, zumbadon de abelo. Plu nenio estas. Fine, kun granda peno mi liberigas el-sub mi la dekstran brakon kaj, min apogante per ambaŭ manoj je la tero, mi volas stariĝi sur la genuoj.

Io akra kaj rapida, kiel fulmo, trapenetras mian tutan korpon, de la genuoj ĝis la brusto kaj la kapo, kaj mi denove falas. Denove mallumo, denove nenio estas.

Mi maldormiĝis. Pro kio mi vidas stelojn, kiuj tiel hele lumas sur malhelblua bulgara ĉielo? Ĉu mi ne estas en tendo? Por kio mi elrampis el ĝi? Mi ekmovas min kaj sentas teruran doloron en la piedoj.

Jes, mi estas vundita en la batalo. Dangere aŭ ne? Mi ekkaptas la piedojn tie, kie doloras. Kaj la dekstra kaj la maldekstra piedoj estas kovritaj de sango. Kiam mi tuŝas ilin, la doloro fariĝas ankoraŭ pli forta. La doloro estas kiel denta: seninterrompa, tiranta. Sonoras en la oreloj, sento de pezeco estas en la kapo. Mi neklare komprenas, ke mi estas vundita je ambaŭ piedoj. Kion ĝi signifas? Pro kio oni ne prenis min? Ĉu la turkoj tute venkis nin? Mi komencas rememori, kio okazis al mi, komence neklare, poste pli klare, kaj mi konkludas, ke ni tute ne estas venkitaj. Ĉar mi falis (cetere, mi ne memoras ĉi tion; mi ne memoras, kiel ĉiuj ekkuris antaŭen, kaj kiel mi ne povis kuri, kaj nur io blua super la okuloj restis ĉe mi en la memoro)—mi falis sur la kampo, supre de monteto. Nia malalkreska bataliona komandanto montris al ni sur tiun ĉi kampon. „Bravuloj, ni estos tie!“ li ekkriis al ni per sia sonorplena voĉo. Kaj ni estis tie: ni ne estas venkitaj... Sed pro kio oni ne prenis min? Tie ĉi la kampo estas senarba, ĉio estas videbla. Certe mi ne kuŝas tie ĉi sola. Ili pafis tiel ofte. Necese estas turni la kapon kaj rigardi. Nun estas pli oportune fari ĉi-tion: tiam, kiam mi, rekonsciiĝinte, vidis herbeton kaj formikon, rampantan malsupren, mi, penante min levi, falis ne en antaŭan staton, sed min turnis sur la dorson. Pro tio tiuj ĉi steloj estas videblaj por mi.

Mi min levas iom kaj sidiĝas. Estas malfacile fari tion, kiam ambaŭ piedoj estas vunditaj. Kelkajn fojojn mi malsukcesas; fine, kun larmoj en la okuloj pro doloro, mi sidiĝas.

Super mi estas peco da malhelblua ĉielo, sur kiu brilas granda stelo kaj kelkaj malgrandaj; ĉirkaŭe estas io malluma, alta. Tio estas arbetoj. Mi estas en arbetaro: oni ne trovis min!

Mi sentas, kvazaŭ la radikoj de miaj haroj movetiĝas sur la kapo.

Tamen kial mi troviĝas en arbetaro, se oni trafis min sur la kampo? Verŝajne, vundita mi transrampis tien ĉi, ne konsciante min pro doloro. Nur estas strange, ke nun mi ne povas eĉ movetiĝi, kaj tiam mi povis rampi ĝis tiuj ĉi arbetoj. Kaj eble tiam mi havis nur unu vundon, kaj alia kuglo trafis min poste ĉi tie.

Palaj rozkoloraj makuloj ekmoviĝis ĉirkaŭ mi. La granda stelo paliĝis, kelkaj malgrandaj malaperis. Tio estas: la luno leviĝas. Kiel bone estas nun hejme!..

Iaj strangaj sonoj atingas min... Kvazaŭ iu ĝemas. Jes, tio estas ĝemo. Ĉu iu same forgesita kuŝas apud mi, kun disbatitaj piedoj aŭ kun kuglo en la ventro? Ne, la ĝemoj estas tiel proksime; kaj apud mi, ŝajnas, neniu estas... Mia Dio, tio estas ja mi mem! Mallaŭtaj kompatindaj ĝemoj; ĉu efektive estas tiel dolore al mi? Verŝajne. Nur mi ne komprenas tiun ĉi doloron, ĉar en la kapo estas kvazaŭ nebulo, plumbo. Estas pli bone, denove kuŝi kaj dormiĝi, dormi, dormi... Nur ĉu mi maldormiĝos iam? Estas tute egale.

Tiun saman minuton, kiam mi estas preta kuŝiĝi, larĝa pala strio de luna lumo hele lumigas la lokon, kie mi kuŝas, kaj mi vidas ion malluman kaj grandan, kuŝantan kvin paŝojn de mi. Lummakuletoj vidiĝas de la luna lumo ie sur ĝi. Tio estas butonoj aŭ municio. Tio estas aŭ kadavro aŭ vundito.

Tute egale, mi kuŝiĝos...

Ne, estas neeble. La niaj ne foriris. Ili estas tie ĉi, ili forpelis la turkojn kaj mem restis sur tiu ĉi pozicio. Sed pro kio estas nek parolado, nek krakado de lignofajroj? Nu ja mi aŭdas nenion pro malforto. Certe, ili estas ĉi tie.

„Helpu!!... Helpu!“

Sovaĝaj, frenezaj, raŭkaj kriegoj eliĝas el mia brusto, sed respondo ne estas al ili. Laŭte ili disportiĝas en la nokta aero. Ĉio alia silentas. Nur griloj krakas kiel antaŭe seninterrompe. Luno kompate rigardas nun per sia ronda vizaĝo.

Se li estus vundita, li rekonsciiĝus pro tia krio. Tio estas kadavro. Nia aŭ turko? He, mia Dio! ĉu tio ne estas tute egala? Kaj dormo malsupreniĝas sur miajn brulumajn okulojn.

Mi kuŝas kun la fermitaj okuloj, kvankam mi maldormiĝis jam antaŭlonge. Mi ne deziras malfermi la okulojn, ĉar mi sentas tra la fermitaj palpebroj sunan lumon: se mi malfermos la okulojn, ĝi dolorigos ilin. Kaj estas pli bone ne movetiĝi... Hieraŭ (ŝajnas, ke tio estis hieraŭ?) oni vundis min; unu tago pasis, aliaj tagoj pasos, mi mortos.

Tute egale. Estas pli bone ne movetiĝi. La korpo estu senmova. Kiel estus bone ĉesigi laboron de cerbo! Sed neeble estas ĉesigi ĝin per io. Pensoj, rememoroj amasiĝas en la kapo. Cetere, ĉio tio ĉi estas ne por longa tempo, baldaŭ estos fino. Nur en gazetoj restos kelkaj linioj, ke niaj perdoj estas nesignifaj; tiom estas vunditaj; soldato, volontulo Ivanov estas mortigita. Ne, oni ne skribos nomon; oni diros simple: unu estas mortigita. Unu soldato, kiel tiu unu hundeto.

La tuta sceno klare aperas en mia imago. Ĝi okazis antaŭlonge; cetere, ĉio, tuta mia vivo, tiu vivo, kiam mi ankoraŭ ne kuŝis tie ĉi kun vunditaj piedoj, estis tiel antaŭlonge... Mi iris sur la strato; grupo da homoj haltigis min. Amaso staris kaj silente rigardis ion blanketan, sangokovritan, kompatinde kriantan. Ĝi estis malgranda bela hundeto: trama vagono transveturis ĝin. Ĝi estis mortanta, ĝuste kiel mi nun. Ia kortisto dispuŝis la homojn, ekkaptis la hundeton je kolo kaj forportis. La homoj disiris.

Ĉu iu forportos min? Ne, kuŝu kaj mortu. Kaj kiel bona estas la vivo!.. Tiun tagon (kiam okazis malfeliĉo al la hundeto) mi estis feliĉa. Mi troviĝis en stato de ia ebrio, kaj ja estis—pro kio. Vi, rememoroj, ne turmentu min, forlasu min! Estinta feliĉo, estantaj suferoj... Sola sufero restu; rememoroj, kiuj nevole igas min kompari, ne turmentu min. He, sopiro, sopiro! vi estas pli malbona, ol vundoj.

Tamen fariĝas varmege. La suno bruligas min. Mi malfermas la okulojn, vidas la samajn arbetojn, la saman ĉielon, nur ĉe taga lumo. Kaj jen estas mia najbaro.

Tio estas turko, kadavro. Kiel granda! Mi rekonas lin, li estas la sama...

Antaŭ mi kuŝas la homo mortigita de mi. Pro kio mi mortigis lin?

Li kuŝas tie ĉi malviva, sangokovrita. Por kio la sorto alpelis lin ĉi tien? Kiu li estas? Eble li, kiel mi, havas maljunan patrinon. Longe ŝi sidas vesperojn apud sia malriĉa dometo kaj ekrigardadas malproksiman nordon: ĉu ne venas ŝia amata filo, ŝia laborulo, ŝia nutranto?..

Kaj mi? Mi ankaŭ... Mi eĉ dezirus interŝanĝi kun li. Kiel feliĉa li estas: li aŭdas nenion, sentas nek doloron de vundoj, nek mortigan sopiron, nek soifon... Bajoneto eniris al li rekte en la koron... Jen sur lia uniformo estas granda nigra truo; ĉirkaŭ ĝi estas sango. Tion ĉi mi faris.

Mi ne volis fari tion. Mi volis fari malbonon al neniu, kiam mi iris por militi. Penso pri tio, ke mi mortigos homojn, iel ne venis al mi. Mi imagis nur, kiel mi kontraŭstarigos mian bruston al kugloj. Kaj mi ekiris kaj kontraŭstarigis.

Nu, kio? Malsaĝulo, malsaĝulo! Kaj tiu ĉi malfeliĉa felaho (sur li estas egipta uniformo) — li estas ankoraŭ malpli kulpa. Antaŭ ol oni sidigis ilin vaporŝipon, kiel harengojn en barelon, kaj ekveturigis Konstantinopolon, li eĉ ne aŭdis pri Rusujo, nek Bulgarujo. Oni ordonis al li iri, li ekiris. Se li ne ekirus, oni komencus lin bati per bastonoj, aŭ eble ia „paŝà“ enigis en lin kuglon el revolvero. Li iris longan malfacilan militiron de Stambulo ĝis Ruŝuko. Ni atakis, li defendis sin. Sed

li vidis, ke ni estas teruraj homoj, ne timantaj lian patentitan anglan pafilon, ke ni ĉiam atakas, kaj teruro ekkaptis lin. Kiam li volis foriri, ia malalkreska homo, kiun li povus mortigi per unu ekbato de sia nigra pugno, alsaltis kaj enigis al li bajoneton en la koron.

Pro kio li estas kulpa?

Kaj pro kio mi estas kulpa, kvankam mi mortigis lin? Pro kio mi estas kulpa? Pro kio soifo turmentas min? Soifo! Kiu scias, kion signifas tiu ĉi vorto! Eĉ tiam, kiam ni estis trairantaj Rumanujon, ĉante en terura kvardekgrada varmego po kvindek kilometroj ĉiutage; tiam mi ne sentis tion, sed nun mi sentas nun. Ho, se iu venus!

Mia Dio! Ja ĉe li, en tiu ĉi granda botelo, certe, estas akvo! Sed necese estas atingi ĝin. Kiel malfacilege estos por mi! Tute egale, mi atingos.

Mi rampas. La piedoj treniĝas, la malfortiĝintaj manoj apenaŭ movas senmovan korpon. Ĝis la kadavro estas kvar metroj, sed por mi tio estos pli multe—ne pli multe, sed pli malbone—ol dekoj da kilometroj. Tamen necese estas rampi. La gorgo brulas, bruligas, kvazaŭ per fajro. Kaj sen akvo mi mortos pli baldaŭ. Tamen, eble...

Kaj mi rampas. La piedoj alkroĉiĝas al la tero, ĉia movo kaŭzas netolereblan doloron. Mi krias, kriegas kun ĝemoj, tamen mi rampas. Fine, jen li estas. Jen botelo... akvo estas en ĝi — kaj kiel multe! Ŝajnas, ke ĝi estas pli ol duone plena. Ho! la akvo sufiĉos al mi dum longa tempo... ĝis morto mem!

Vi savas min, mia viktimo!.. Mi komencis deligi la botelon, min apoginte per unu kubuto, kaj subite, perdinte ekvilibron, mi falis per vizaĝo sur la bruston de mia savinto. De li jam sentiĝis forta kadavra odoro.

Mi trinkis. La akvo estis varma, sed ne difektita kaj ankaŭ estis multo da akvo. Mi ankoraŭ travivos kelkajn tagojn. Mi rememoris, ke en „Fiziologio de ĉiutaga vivo“ estas dirite, ke sen manĝo homo povas travivi pli ol semajnon, se nur li havos akvon. Jes, tie ankaŭ estas rakontita historio de memmortiginto, kiu sin mortigis per malsato. Li vivis tre longe, ĉar li trinkis.

Nu, kio? Se mi travivos ankoraŭ kvin-ses tagojn, kio fariĝos de tio? La niaj foriris, la bulgaroj diskuris. Vojo ne estas proksima. Tute egale, mi mortos. Nur anstataŭ tritaga agonio mi faris al mi semajnan. Ĉu ne estas pli bone fini? Apud mia najbaro kuŝas lia pafilo, bonega angla faraĵo. Se mi nur etendos la manon; poste—unu momento kaj... fino. Kartocôj kuŝas tie ĉi, amase. Li ne elpafis ĉiujn.

Nu, fini aŭ atendi? Kion? Savon? Morton? Atendi, ke turkoj alveturos kaj komencos senhaŭtigi miajn vunditajn piedojn? Estos pli bone, se mi mem finos.

Ne, ne necese estas perdi kuraĝon; mi batalos ĝis la fino, ĝis lastaj fortoj. Ja se oni trovos min, mi estos savita. Eble, la ostoj ne estas vunditaj; oni resanigos min. Mi ekvidos la patrujon, la patrinon, Manjon...

Dio, ne lasu al ili sciigi la tutan veron! Ili opinios, ke

mi estis mortigita per unu fojo. Kio fariĝos al ili, se ili sciĝos, ke mi turmentiĝis du, tri, kvar tagojn!

La kapo turniĝas; mia vojaĝo al la najbaro tute el-turmentis min. Kaj ankoraŭ tiu ĉi terura malbonodoro. Kiel li nigriĝis... kia li estos morgaŭ aŭ postmorgaŭ? Kaj nun mi kuŝas tie ĉi nur pro tio, ke fortoj mankas por forrampi. Mi ripozos kaj ekrampos antaŭan lokon; ĝustokaze, vento blovas de tie kaj forportas de mi malbonodoron.

Mi kuŝas en stato de plena malforteco. La suno bruligas mian vizaĝon kaj miajn piedojn. Nenio estas por min kovri. Se nokto venus pli baldaŭ; ŝajnas, ke ĝi estos dua nokto.

Pensoj miksiĝas kaj mi senkonsciĝas.

Mi dormis longe, ĉar, kiam mi maldormiĝis, estis jam nokto. Ĉio estas kiel antaŭe; la vundoj doloras, la najbaro kuŝas, tiel granda, senmova.

Mi ne povas ne pensi pri li. Ĉu efektive li forlasis ĉion karan, iris ĉi tien por milkilometra militiro, malsatis, malvarmis, turmentiĝis pro varmego; ĉu efektive fine mi kuŝas nun tiel suferante—nur pro tio, ke tiu ĉi malfeliĉulo ĉesu vivi? Ĉu mi faris ion utilan por militaj celoj krom tiu ĉi mortigo?

Mortigo, mortiginto... Kaj kiu? Mi!

Kiam mi intencis ekiri por milito, la patrino kaj Manjo ne malkonsilis al mi, kvankam ili ploris pri mi. Blindigita per la ideo, mi ne vidis tiujn larmojn. Mi ne

komprenis (nun mi komprenas), kion mi faris al miaj plejproksimuloj.

Sed por kio rememori? Ne eble estas revenigi la pasinton.

Kaj kiel strange multaj konatuloj traktis mian agon! „Nu, sensenculo! Li intencas ekiri, mem ne sciante por kio!“ Kiel ili povis paroli ĉi tion? Kiel kunligi tiajn vortojn kun iliaj ideoj pri heroeco, pri amo al patrujo kaj pri ceteraj tiaj aferoj? En iliaj okuloj mi prezentis ja ĉiujn tiujn ĉi virtojn. Kaj tamen mi estas „sensenculo“.

Kaj jen mi veturas Kiŝinjòv'on; oni surmetas sur min tornistran kaj tutan municion. Kaj mi iras kune kun miloj, inter kiuj troviĝas apenaŭ kelkaj, irantaj, simile al mi, volonte. La ceteraj restus hejme, se oni permesus al ili. Tamen ili iras tiel same, kiel ni, „konsciantoj“, pasas milojn da kilometroj kaj militbatalas tiel same, kiel ni, kaj eĉ pli bone. Ili plenumas siajn devojn, malgraŭ tio, ke ili tuj forlasus nin kaj forirus, se oni nur permesus.

Ekblovetis freŝa matena venteto. Arbetoj ekmovetiĝis, duondormanta birdeto ekflirtis. Steloj senheliĝis. Malhelblua ĉielo griziĝis, iomete kovriĝis per delikataj plumformaj nuboj; griza duonmallumo estis leviĝanta de la tero. Komenciĝis tria tago de mia... Kiel nomi? Vivo? Agonio?

Tria .. Kiom da ili ankoraŭ restas? Ĉiuokaze, nemulte. Mi tre malfortiĝis kaj, ŝajnas, ke mi ne povas forrampi de la kadavro. Baldaŭ ni egaliĝos kaj ne estos malagrablaj unu al alia.

Necese estas trinki. Mi trinkos trifoje ĉiutage: matene, tagmeze kaj vespere.

La suno leviĝis. Ĝia granda disko, tute dispecigita per nigraj branĉoj de arbetoj, estas ruĝa kiel sango. Ŝajnas, ke hodiaŭ estos varmege. Mia najbaro—kio fariĝos al vi? Vi nun estas vere terura.

Jes, li estis terura. Liaj haroj komencis elfali. Lia haŭto, nature nigra, paliĝis kaj flaviĝis; la ŝvelinta vizaĝo streĉis la haŭton tiel, ke ĝi krevis post la orelo. Tie vermoj movetiĝis. La piedoj, vestitaj per ŝuoj, ŝvelis, kaj grandaj vezikoj eliĝis inter hoketoj de la ŝuoj. Kaj li tute pufiĝis kiel monto. Kion la suno faros al li hodiaŭ?

Kuŝi tiel proksime al li estas netolereble. Mi devas derampi, ĉiuokaze. Sed ĉu mi povos? Mi povas levi la manon, malfermi la botelon, trinki; sed—transmovi mian pezan senmovan korpon? Tamen mi movos min, kvankam po nemulte, kvankam po duonpaŝo ĉiuhore.

Tuta mateno pasas en tia transmoviĝo. La doloro estas forta, sed kio ĝi estas nun por mi? Mi jam ne memoras, ne povas prezenti al mi sentojn de sana homo. Mi kvazaŭ eĉ alkutimiĝis al doloro. Tiun ĉi matenon mi derampis tamen kvar metrojn kaj troviĝis sur la antaŭa loko. Sed ne longe mi spiris la freŝan aeron, se povas esti freŝa aero ses paŝojn de la putranta kadavro. La vento ŝanĝiĝas, kaj denove alportas al mi malbonodoron, tiel fortan, ke mi sentas naŭzon. La malplena stomako kuntiriĝas turmente kaj konvulsie; ĉiuj internaĵoj transturniĝas. Kaj malbonodora infektita aero ĉiam fluas sur min.

Mi malesperas kaj ploras.

Tute malfortiĝinta, mi kuŝis preskaŭ sen konscio. Subite... ĉu estas trompo de malordiĝinta imagado? Ŝajnas al mi ke—ne. Jes, tio estas parolado. Ĉevala piedfrapado, homa parolado. Mi preskaŭ ekkriis, sed min detenis. Kaj se ili estas turkoj? Kio do? Al tiuj ĉi suferoj aldoniĝas ankoraŭ aliaj pli teruraj, pro kiuj la haroj leviĝas sur la kapo, eĉ kiam oni legas pri ili en gazetoj. Oni senhaŭtigos, bruligos sur fajro la vunditajn piedojn... Bone, se nur ĉi tio; sed ja ili estas eltrove-maj. Ĉu estos pli bone fini vivon en iliaj manoj, ol morti ĉi tie? Sed se ili estas niaj? Ho, malbenitaj arbe-toj! por kio vi elkreskis ĉirkaŭ mi, tia densa baraĵo? Mi vidas nenion tra ili; nur en unu loko, kvazaŭ fenestro inter branĉoj, malfermiĝas al mi vido malproksimen, en valetan. Tie, ŝajne, estas la rivereto, el kiu ni trinkis antaŭ la batalo. Jen granda ŝtona plataĵo metita trans la rivero kiel ponteto. Certe ili rajdos laŭ ĝi. La parolado ĉesas. Mi ne povas kompreni la lingvon, per kiu ili parolas: mia aŭdosento malfortiĝis. Dio! se ili estus niaj... Mi ekkrios al ili, ili ekaŭdos min eĉ de la rivereto. Tio estas pli bone, ol riski fali en manojn de baŝibuzukoj. Pro kio ili ne rajdas tiel longe trans la rivereto? Malpacienco turmentas min; mi eĉ ne rimarkas malbonodoron de la kadavro, kvankam ĝi neniom malfortiĝis.

Kaj subite sur transirejo trans la rivereto montriĝas kozakoj! Bluaj uniformoj, ruĝaj pantolonaj strioj, pikilegoj. Tuta duoncento estas da ili. Antaŭe, sur bonega ĉevalo, estas nigrobarba oficiro. Ĝus kiam la duoncento transpasis la rivereton, li sin turnis reen sur la selo per la tuta korpo kaj ekkriis:

„Trote!“

— Haltu, haltu, pro Dio! Helpu, helpu, fratoj! — mi krias; sed la piedfrapado de fortaj ĉevaloj, tintado de sabroj kaj brua parolado de la kozakoj estas pli laŭtaj ol mia stertoro,—kaj ili ne aŭdas min!

Ho, malbeno! Malfortiginte mi falas teren per vizaĝo kaj komencas ploregi. El la botelo renversita de mi fluas la akvo, mia vivo, mia savo, mia prokrasto de morto. Sed mi rimarkis tion ĉi nur, kiam restis ne pli ol duonglaso da akvo, kaj la cetera akvo eliĝis en avidan sekan teron.

Ĉu mi povas rememori tian staton de terurego, kiu ĉirkaŭprenis min post tiu ĉi terura okazo? Mi kuŝis senmove, kun duonfermitaj okuloj. La vento ofte ŝanĝiĝis, kaj jen freŝa kaj pura aero blovis sur min, jen ĝi ĉirkaŭblovis min per malbonodoro. La najbaro dum tiu ĉi tago fariĝis pli terura ol iu povus priskribi. Unufoje, kiam mi malfermis la okulojn por ekrigardi lin, mi estis terurita. La vizaĝo jam ne estis. Ĝi foriĝis de la ostoj. La terura osta rideto, eterna rideto, ekŝajnis al mi tiel abomena, tiel terura, kiel neniam, kvankam pli ol unu fojon okazis al mi teni en manoj kraniojn kaj prepari tutajn kapojn. Tiu ĉi skeleto en uniformo kaj kun helaj butonoj igis min terurtremi. „Tio estas milito, mi pensis;—jen estas ĝia figuraĵo“.

Kaj la suno bruligas kiel antaŭe. La manoj kaj la vizaĝo estas ĉe mi jam antaŭlonge bruligitaj. Mi eltrinkis la tutan restantan akvon. Soifo tiel forte turmentis min, ke mi, decidinte eltrinki nur iomete, englutis ĉion per unu

fojo. Ha, pro kio mi ne ekkriis al la kozakoj, kiam ili estis tiel proksime de mi! Se tio estus eĉ turkoj, estus pli bone. Nu, ili turmentus unu horon, du, sed nun tie ĉi mi eĉ ankoraŭ ne scias, kiom da tempo mi kuŝos ĉi tie kaj suferos. Mia panjo, mia kara! Vi elŝiros viajn grizajn harojn, vi batiĝados per la kapo je muro, vi malbenos tiun tagon, kiun vi naskis min, vi malbenos la tutan mondon, kiu eltrovis militon por suferado de homoj!

Sed vi kun Manjo, eble, eĉ ne sciigos pri miaj suferoj. Adiaŭ, panjo, adiaŭ, Manjo, mia fianĉino, mia amatino! Ha kiel turmente, kiel maldolĉe! La koro premiĝas...

Denove tiu ĉi malfeliĉa hundeto! La kortisto ne kompatis ĝin, ekbatis ĝin per kapo je muro kaj ĵetis en kavon, kien oni ĵetas balaaĵon kaj verŝas postlavan akvon. Sed ĝi estis viva. Kaj ĝi ankoraŭ suferis tutan tagon. Kaj mi estas pli malfeliĉa ol ĝi, ĉar mi suferas tutajn tri tagojn. Morgaŭ — кvara, poste kvina, sesa...: Morto, kie vi estas? Venu, venu! Prenu min!

Sed la morto ne venas, ne prenas min. Kaj mi kuŝas sub tiu ĉi terura suno kaj ne havas eĉ guton da akvo, por freŝigi al mi la varmegiĝintan gorgon, kaj la kadavro infektas min. Ĝi tute fluidiĝis. Miriadoj da vermoj elfalas el ĝi. Kiel ili movetiĝas! Kiam ĝi estos jam manĝita kaj restos de ĝi sole la ostoj kaj la uniformo, tiam estos mia vico. Kaj mi estos tia sama.

Tago pasas, nokto pasas. Ĉio estas la sama. Mateno venas. Ĉio estas la sama. Ankoraŭ tago pasas...

La arbetoj movetiĝas kaj bruetas kvazaŭ ili mallaŭte interparolas. „Jen vi mortos, mortos, mortos!“ ili murmuretas. „Vi ne ekvidos, ne ekvidos, ne ekvidos!“ respondas arbetoj de alia flanko.

— Tie ĉi ja ne eble estas ekvidi ilin!—laŭte aŭdiĝas apud mi.

Mi ektremetas kaj tuj rekonsciiĝas. El arbetoj rigardas min la bonaj bluaj okuloj de Jàkovlev, nia kaporalo.

— Fosilojn!—li krias.—Jen du, kaj unu estas ilia. „Vi ne bezonas fosilojn, ne estas necese min enterigi, mi estas viva!“—mi volas ekkrii, sed nur malforta ĝemo eliĝas el miaj sekiĝintaj lipoj.

— Dio! Ja li estas viva! Nia sinjoro Ivanov! Bravuloj! Venu ĉi tien! nia sinjoro estas viva! Kaj voku kuraciston!

Post duonminuto oni verŝas en mian buŝon akvon, brandon kaj ankoraŭ ion. Poste ĉio malaperas.

Portilo moviĝas, balanciĝante egalmezure. Tiu ĉi egalmezura movado dormigas min. Mi jen maldormiĝas, jen denove dormiĝas. La bandaĝitaj vundoj ne doloras; ia neesprimeble ĝojiga sento disfluiĝas en la tuta korpo...

— Haltu! Malsuprenigu! Flegistoj, kvara ŝanĝo! prenu portilon, levu!

Tion ĉi komandas Petro Ivànoviĉ, nia malsanuleja oficiro, altkreska, malgrasa kaj tre bonkora homo. Li estas tiel altkreska, ke, turninte la kapon al lia flanko, mi ĉiam vidas lian kapon kun longa maldensa barbo kaj ŝultrojn, kvankam kvar altkreskaj soldatoj portas la portilon.

— Petro Ivànoviĉ!—mi murmuretas.

— Kion, karulo?

Petro Ivanoviĉ sin klinas super mi.

— Petro Ivanoviĉ, kion la kuracisto diris al vi? Ĉu mi mortos baldaŭ?

— Nu, kion, Ivanov, ĉesu! Vi ne mortos. Ĉiuj ostoj estas ja nedifektitaj ĉe vi. Kia feliĉulo! Nek ostoj, nek arterioj! Kiel vi travivis tiujn ĉi tri tagojn kaj duonon? Kion vi mangis?

— Nenion.

— Kaj kion vi trinkis?

— Mi prenis la botelon de la turko. Petro Ivànoviĉ, mi ne povas paroli nun. Poste...

— Nu, Dio estu kun vi, karulo, dormu.


Denove dormo, senkonscio...

Mi rekonsciigis en divizia malsanulejo. Apud mi staras kuracistoj, flegistinoj, kaj krom ili mi vidas konatan vizaĝon de famekonata peterburga profesoro, sin klinanta super miaj piedoj. Liaj manoj estas kovritaj per sango. Li klopodas apud miaj piedoj nelonge kaj sin turnas al mi:

— Nu, vi estas feliĉa, juna homo! Vi restos viva. Unu piedon ni forprenis de vi; sed tio ja estas bagatelo. Ĉu vi povas paroli?

Mi povas paroli kaj mi rakontas al ili ĉion, kio estas skribita ĉi tie.

ВСЕМИРНАЯ БИБЛИОТЕКА ВЪ ПАМЯТЬ Л. Н. ТОЛСТОГО.
TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ.

- 
- L. Tolstoj. Dio unu por ĉiuj (Surata kafejo) (Богъ одинъ у всѣхъ.)
Prezo 5 k. (5 sd.);
Unu animo en ĉiuj (Одна душа во всѣхъ.) Prezo 10 k. (10 sd.).
Unua ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado. (Первая ступень.)
Prezo 25 k. (25 sd.).
Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros. (Богъ правду видитъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
Du maljunuloj. (Два старика.) Prezo 15 k. (15 sd.).
Kie estas amo, tie estas Dio. (Гдѣ любовь, тамъ и Богъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
Sieĝo de Sebastopolo. (Осада Севастополя.) Prezo 35 k.
(35 sd.).
Kaŭkaza militkaptito. (Кавказскій плѣнникъ.) Prezo 20 k.
(20 sd.).
„ Per kio homoj estas vivaj. (Чѣмъ люди живы.) Prezo 15 k.
(15 sd.).
Najivin. Pri kio la steloj parolas. (О чемъ говорятъ звѣзды.) Prezo 15 k.
(15 sd.).
Garŝin. Kvar tagojn sur kampo de batalo. (Четыре дня на полѣ сраженія.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
„ Signalo. (Сигналъ.) Prezo 10 k. (10 sd.).
„ Legendo pri fiero Ageo. (Сказаніе о гордомъ Аггеѣ.) Prezo
10 k. (10 sd.).
Semjonov. Kortisto (kun autaŭparolo de L. Tolstoj.) (Дворникъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).
Lastaj kvin tradukoj estas korektitaj de la anoj de Esper.
Literat. Asocio.

Estas presataj:

- L. Tolstoj. KREDU AL VI MEM. (Вѣрьте себѣ.)
„ AMU UNU ALIAN. (Любите другъ друга.)
L. Tolstoj. Unua, dua, tria, kvara kaj kvina libretoj por infanoj.
(1, 2, 3, 4 и 5 книжки для дѣтей).
V. Korolenko. La infanoj de la subteraĵo (Дѣти подземелья.)
Aksakov. Skarlata floreto. (Аленькій цвѣточекъ.)
Rusaj popolaj fabeloj. (Русскія народныя сказки.)

Libroj estas vendataj en la librovendejo „Posrednik“ (Moskvo, Petrovskaja linio) kaj en aliaj librovendejoj. Por mendoj sin turnin la ĉefan librotenejon de la eldonoj de „Posrednik“: Moskvo, Arbato, 36, al I. I. Gorbunov.

Выписывать изъ главнаго склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, 36. И. И. ГОРБУНОВУ.

Цѣна 10 коп.—Prezo 10 sd.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.

Internacia lingvo.

ВЪ ИЗДАНИИ „ПОСРЕДНИКА“.

1) Н. Кабановъ. Вспомогательный международный языкъ эсперанто. Съ письмомъ Л. Н. Толстого объ языкъ эсперанто. Цѣна 12 коп.

N. Kabanov. Internacia helplingvo Esperanto. Kun letero de L. Tolstoj pri la lingvo Esperanto. Prezo 12 sd.

2) Н. Кабановъ. Первая эсперантская книга для чтенія съ грамматикой и словаремъ. Второе изданіе. Цѣна 25 коп.

N. Kabanov. Unua esperanta legolibro kun gramatiko kaj vortaro, Dua eldono. Prezo 25 sd.

3) Н. Кабановъ. Полная грамматика эсперантскаго языка. Съ примѣрами, упражненіями и съ переводомъ упражненій на русскій языкъ. Второе изданіе. Цѣна 45 коп.

N. Kabanov. Plena gramatiko de la lingvo esperanto. Kun ekzemploj, ekzercoj kaj kun rusa tradiko de la ekzercoj. Dua eldono. Prezo 45 sd.

4) Л. Л. Заменгофъ. Основы международнаго языка Эсперанто. Второе изданіе. Цѣна 35 коп.

L. L. Zamenhof. La fundamento de la internacia lingvo Esperanto. Dua eldono. Prezo 35 sd.

5) Н. Кабановъ. Самый легкій языкъ—Эсперанто. Самоучитель эсперантскаго языка для дѣтей, юношества и для всѣхъ, начинающихъ его изучать. Цѣна 35 коп.

N. Kabanov. La plej facila lingvo—Esperanto. Memlernolibro de la lingvo Esperanto por infanoj, gejunuloj kaj por ĉiuj komencantaj lerni ĝin. Prezo 35 sd.

6) Н. Кабановъ. Краткій русско-эсперантскій словарь. Цѣна 40 коп.

N. Kabanov. Rusa-esperanta vortaro. Prezo 40 sd.

7) Н. Кабановъ. Полный эсперантско-русскій словарь. Ц. 70 к.

N. Kabanov. Plena esperanta-rusa vortaro. Prezo 70 sd.

Продаются въ книжномъ магазинѣ „ПОСРЕДНИКЪ“ (Москва, Петровскія линіи) и въ другихъ книжныхъ магазинахъ. Выписывать можно изъ главн. склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, 36.

И. И. ГОРБУНОВУ.